



Komentario pri la Agadprogramo Doha por la Malplej Evoluintaj Landoj. Malneto Nulo

prezentita de Universala Esperanto-Asocio

Universala Esperanto-Asocio (UEA) trastudis la malneton nulo de la *Agadprogramo Doha por la Malplej Evoluintaj Landoj (MELoj)*. Ni laŭdas la ampleksan pritrakton de faktoroj rilataj al la socia, ekonomia kaj natura evoluigo inkluzivitaj sub la ses ŝlosilaj fokusterenoj de la Agadprogramo. Ni aparte notas, ke la malneta dokumento inkluzivas la fakton, ke homoj kiuj loĝas en MELoj havas limigitan aŭ neniun aliron al altkvalita edukado. Kiel neregistara organizo (NRO) dediĉita al antaŭenigo de lingva justeco, UEA sugestas, ke la rolo de lingvo kaj edukado en antaŭenigo de la ses fokusterenoj ricevu pliajn pripensadon kaj atenton.

Ĝis 40 procentoj de la monda enloĝantaro ne havas aliron al edukado en lingvo kiun ili komprenas. Lastatempaj raportoj pri Tutmonda Kontrolado de Edukado substrekas tiun mankon de lingva aliro kiel signifan minacon al edukadaj justeco kaj inkluzivo (Celo por Daŭripova Edukado n-ro 4). La Monda Banko, en sia referaĵo de julio 2021 *Tute Klare: Efikaj Instrulingvaj Politikoj por Lernado* emfazas, ke lingva aliro al edukado estas esenca ne nur por lernado en si mem sed por ĉiu aspekto de evoluigo, ĉar la konstruado de socia kaj ekonomia kapitalo kaj la plivastigo de scioj kaj lertoj estas ĉiuj lingve bazitaj.

Sekve, UEA instigas Membrajn Ŝtatojn dediĉi plian atenton al multlingva edukado, specife al tiu multlingva edukado bazita je la gepatra lingvo (angle: MTB MLE), dum la neformala konsulta procezo. Ni sugestas kiel utilajn fontojn de pliaj informoj la jam menciitan dokumenton de la Monda Banko, kiel ankaŭ materialojn de UNESKO pri lingvo kaj edukado, precipe ties *MTB MLE Resource Kit* (Rimedokompleto pri gepatralingve bazita multlingva edukado).

Multlingvismo konsistigas fundamenton por daŭripova evoluigo. Tiuj, kiuj ne komprenos, restos postlasitaj.

Prezentita de prof. Francis M. Hult, nome de Universala Esperanto-Asocio al la Konsultiĝo de Civila Socio kun Membraj Ŝtatoj Anticipe al la Dua Preparkomitata Kunveno por la Kvina Konferenco de Unuiĝintaj Nacioj pri la Malplej Evoluintaj Landoj (LDC 5)

28 Julio 2021